

Historio pri la ekesto, kreskado kaj florado de nia Esperanto-Grupo “Paco kaj Justeco” 1937-1947

[Transskribo de malbone legebla tajpita kaj manskribita teksto. La gramatikaj eraroj el la originalo ne estis korektitaj; nur estis kelkaj adaptoj por igi la tekston pli agrable legebla, ekzemple aldono de komoj kaj la minuskligo de la monato-nomoj. – rr – 10/2021]

Antaŭparolo

Se mi hodiaŭ komencas en ĉi-tiuj paĝoj rakonti pri la historio de nia grupo ĝi ne estas kun la intenco surpaperigi neniondirantajn datojn, lokojn kaj personojn, por neforgesigi al la posteularo, tiel kiel la ĉefokazintaĵoj al antikva historio, sed nur celante enpenetri la odiseon de la grupo en la cerboj kaj koroj de ĉiuj niaj gemembroj kaj gesimpatuloj. Tiucele mi forigos ĉion komplikan kaj rakontos detale kaj facilvorte – memorante pri la fabelrakontanta avino kiu sukcesas kapti atentegon de l’geknabaro – pri ĉio rilate al nia kara E-grupo por ke finfine pli multe da gemembroj ol la du aŭ tri ĉiamaj pioniroj almenaŭ ion sciu kaj poste memoru de la jam dekjara ekzistadbatalado de nia klubo. Ĉefe mi pritraktos la internan vivon de nia societo, ĉar mi opinias ke ĝi estas la afero kiu plej interesos kaj entuziasmigos la junan gemembraron kaj ĝin poste instigos sekvi la paŝojn de la antaŭuloj. Do, kiel en la lernejo oni senĉese nin instruadas kaj ripetadas pri la gloraj faktoj de niaj prapatroj, por ke ni sekvu ilian ekzemplon kaj fariĝu iam bonegaj patrujuloj, tiel mi ankaŭ vin instruados – ne nur pri la brila flanko kiel en la landa historio, sed ankaŭ pri la malhelaj okazintaĵoj – pri bon- kaj malbonfarto de la klubo, por ke ni iĝu fervoraj gemembroj de nia sekcio kaj fidelaj, konvinkitaj geadeptoj de nia movado.

Por ke la gemembraro pli bone komprenu la kaŭzon de la ekesto de nia grupo mi ilin devas peti momenton por klarigi nekonvenan situacion en nia lando, sekve ankaŭ en nia urbo Bruĝo, rilate al la lingva problemo. Antaŭ la mondmilito 1914-1918 preskaŭ ĉiujn societojn – kaj Dio sciu kiom da klubetoj ekzistas en Belgujo – estris francparolantaj aŭ almenaŭ franclingoŝatantaj komitatanoj. Ofte okazis ke gemembroj kaj gvidantoj ne komprenis unu la alian. Tiu bedaŭrinda fakto iom ekŝanĝis de post fino de l’mondmilito sed bezonis ekstarigo de sendependaj flandra ligoj kiel V.T.B. (Flandra Turista Unuiĝo)¹, Flandra Kruco², Flandra Fotoklubo, ktp., ktp., por ke fine la flandranoj ekhavu justan rajton. Ankaŭ la flandra geesperantistaro forŝiriĝis de la Belga Ligo³ kaj ekestis E-grupoj en ĉiuj urboj kaj komunumoj de Flandrujo. Nur Bruĝo kompreneble – kie cetere estis la plej forta E-grupo⁴ de Belga Ligo – ĉiam malrapida se temas pri necesaj reformaĵoj, ne sekvis la laŭdindan ekzemplon. Kaj multajn gejunulojn – mi parolas pri propra sperto – la Esperanto-movado perdis ĉar ili ne ŝatis aliĝi al klubo kiu ne sufiĉe respektis la gepatran lingvon.

¹ https://nl.wikipedia.org/wiki/Vlaamse_Toeristenbond-Vlaamse_Automobilistenbond

² https://nl.wikipedia.org/wiki/Het_Vlaamse_Kruis

³ https://eo.wikipedia.org/wiki/Belga_Ligo_Esperantista

⁴ https://eo.wikipedia.org/wiki/Bruĝa_Grupa_Esperantista

Jaro 1937: Ekesto - kaŭzo kaj sekvo

Jen la situacio komence de januaro 1937 en nia kara urbo Bruĝo. Necesis iniciato de V.T.B.-ligo (sekcio de Bruĝo) kaj senprofita kaj sindonema laborado de nia hodiaŭa prezidanto Fernand Roose⁵, kiu profundkore sentis la postulon sekretan de multaj personoj, por kontraŭstari la ĝisnunan fisituacion organizante Esperanto-kurson flandraopinie. Estis la kerno de la ekesto de nia nuna grupo.

La 14-a de januaro 1937 okazis do en la bruĝa junulgastejo⁶ provleciono esperanta. Ĝin sekvis 23 gekursistoj pleninterese. La ĉeĥa profesoro Karlo Ŝolc⁷ – ĉiuj kiuj havis la honoron interrilati kun li certe memoros ĉiam la agrablan mienon kaj la nerezisteblan konvinkon kiuj elradiis de lia persono – gvidis la kurson. La intereseĝaj, spritaj, eĉ humoraj, lecionoj de la instruisto kaj precipe lia simpatio per kiu li kvazaŭ ensorcis la aŭdantaron faris baldaŭ amikan rondon de ĉiuj gekursistoj.

La 18-a de marto 1937 la kurso finis per memorinda inter-ni vespero: t.e. ni kantis, faris muzikon, deklamis, disdonis la diplomojn, dancis ktp. La gelernintoj oferis propravole memorigaĵon al s-ro Ŝolc kiun kortuŝis la ago. Fine unuope oni konsentis kunresti por fondi E°-grupon sendependan de la jam ekzistanta Reĝa Bruĝa Grupa Esperantista (sekcio de Belga Ligo) klubo en nia urbo. Tiamaniere ekestis “Paco kaj Justeco”, la bruĝa sekcio de Flandra Ligo Esperantista.⁸ Antaŭ ol hejmeniri fotografaĵo eternigis la ekeston kaj estraro jene formiĝis: prezidanto: E. D’Haenens, vic-prezidanto Fernand Roose, sekretario: E. Van Heulebrouck⁹ kaj kasistino: Maria Vincke¹⁰.

Komenca periodo

Mi tuj diras ke oni – mi ignoras kiu elektis la estraron – eraregis en la elektado. Oni eble nur rimarkis la profesion sed ne atentis la kapablecon. Tiamaniere okazis ke nur kelkaj semajnoj E. D’Haenens restis prezidanto kaj poste Fernand Roose lin anstataŭigis. Ankaŭ la elektita sekretario forlasis la estraron kiam la unua tasko postulis laboradon. Roger Iserentant, la hodiaŭa sekretario, lin postsekvis. Imitante la ekzemplon de nia Majstro Zamenof ni paŝo post paŝo iris antaŭen al celo. Malgraŭ malfacilaĵoj ĉiuspecaj – jen post mallonga tempo kelkaj forlasis la movadon rompante ilian parolon je promesita kunlaborado – ni ne perdis la kuraĝon. Tiuj kiuj nin forlasis ĝin ĉiam faris por t.n. aferoj personaj, plejofte ankoraŭ tre malgrandanimaj.

La ŝipeto – mi volonte komparas nian klubeton al ĝi – komence penadis sin bone teni sur ondegoj furiozantaj de ĝuste fondita unuiĝo, sed la ŝipestroj (nun ne plu la unu-tag-muŝoj) regis ilian taskon kaj gvidis tra labirinto de rifoj kaj advoturniĝoj la malgrandan kaj rompiĝeman boateton al sekura

⁵ https://eo.wikipedia.org/wiki/Fernand_Roose

⁶ Jam anoncita en oktobro 1926 en la loka gazetaro, sen dato. Anoncita i.a. en ‘Het Belfort’, 16.1.1937: ‘Donderdag 21 januari: Te 19.30 in de zaal van de Jeugdherberg 8, St. Jansplaats, kostelooze proefles van Esperanto gegeven door den Csehleeraar Karolo Solc., uit Tcheco-Slovakije, die uitsluitend Esperanto spreekt. Vooraf inleidende voordracht over de beteekenis van Esperanto.’ Ne estis trovita anonco pri la 14a de januaro.

⁷ Ne ekzistas Vikipedio-paĝo pri Ŝolc. Biografieto aperis en Horizont-taal 133, p. 10-11 kaj en ‘La Hirundo’ (Tienen), numero 4, p. 16-17 (represita en ‘La pra-esperantistoj de Tienen’, vidu Vikiflandrio. Afiŝo anoncanta liajn kursojn estas je <https://www.flickr.com/photos/22366608@N00/5418020676/in/photolist-9fLLMA-9fJmWt-9fMtL3-9fJnLc>

⁸ https://eo.wikipedia.org/wiki/Flandra_Ligo_Esperantista

⁹ Verŝajne Evarist Van Heulebrouck, estrarano de VTB. (<https://advn.be/nl/db/AV051845>)

¹⁰ Loĝis je Torhoutse Steenweg 3, Sint-Andries. Rapida serĉado en www.archiefbankbrugge.be liveris nur unu personon kun tiu nomo: Maria Alida Léontine Vincke, °Brugge 30.10.1891. Plu esplorota.

haveno. Malrapide sed certe la ŝipeto daŭrigis navigadon. Ni jam posedis ejon – trinkejo “Diligentie”¹¹ en la Hoogstrato en Bruĝo – ĝuste tiel kiel ĉiu respektinda klubo.

Grada kreskado

Tiel ofte kiel eblis ni nin fidis al moderna lernmetodo, t.e. la plenaerkunvenoj. Tiamaniere ni ne nur zorgis pri la sano de niaj geklubanoj sed ankaŭ ŝparis la malmulte da mono kiun nia kaso enhavis.

Kelkaj paroladoj de nia prezidanto aŭ deklamadoj (ambaŭ esperantlingve) de nia sekretario, ĉu en, ĉu ekster nia ejo, kaj ankaŭ biciklaj ekskursoj propagandcele plenigis la programon ĝis finjaro 1937 kaj instigis al vigla laborado por 1938.

Ĉirkaŭ fino de julio la grupo pli kaj pli konatiĝis pere de la necesa korespondaĵo propagandcele kaj precipe kongresorganizaĵcele. Efektive ni jam dum monato septembro 1937 dum ligkunveno en Gent (post apenaŭ 6 monata fondiĝo) akceptis la kongresorganizado 1938.

Menciinda estas nia unua oficiala skribado. Ĝi celis obtenon de salono en junulargastejo por organizi la E-vintrokurson. Pripensu ke ni apenaŭ depost duonjaro ekzistis kiam tiu iniciato realiĝis. Tamen la kurso malgraŭ intensa propagando malsukcesis. Mi tuj diru ke la estraranoj ne kulpis pri tiu fakto. La ĝenerale opinio estis: ĉehinstruisto s-ro Boersma¹² ne sufiĉe simpatia (multaj sin ankoraŭ memoris s-ro Karlo Ŝolc) kaj konkurencego de la malnova alia grupo kiu samtempe donis vintrokurson.

Sed ne nur venkante baron kaj eĉ batojn sen ŝanceliĝi, grupo iĝas forta: ni pripensis tion ne plendante pro la malsukceso laŭ ĉiuj vidpunktoj sed des pli vigle daŭrigante la laboradon dum la nova jaro 1938

Jaro 1938 – Brilega periodo

Ĉiuj tiuj kiuj jam estis gemembroj de “Paco kaj Justeco” certe hodiaŭ pripensante tiun jaron ekkrios unuope kun mi: “Kiaj gajegaj memoroj, kiaj brilegaj rezultatoj, kiaj nekredeblaj sukcesoj tiu al ni neforgesebla jaro entenis”. Estis nia kongresjaro. Mi jam supre menciis ke nia grupo akceptis kongresorganizado post apenaŭ duonjara ekzistado. Kiel tute nova grupo – ni ĝuste 13 monatoj fondiĝis je kongresdato – kaj tre malmultnombraj (ni estis nur dudek gemembroj el kiuj certe 15 eĉ ne unu literon surpaperigis kongresorganizaĵcele) ni kuraĝis alvoki la geesperantistaron al nia urbo. Ni pripensu ke preskaŭ senescepte ĉiuj eventualaj alvenontoj jam iam vizitis kongresojn; ja, eĉ mem foje organizis tiuspecajn kunvenojn kaj sekve havu sperton en la lingvo kaj belsonan nomon en la movado.

Niaflanke, nur unu persono, la prezidanto, estris senerare la lingvon kaj jam griziĝis en la movado. Ĉiuj aliaj estis suĉinfanoj en Esperanto-mondo, gekursistoj de la ĝuste finita kurso. Ni konfesu ke mi pli bone parolus pri kongresaventuro anstataŭ organizado. Sed kie regas la volo la vojo sin desegnas. Kaj certe ne la volo mankis al la kvin gepioniroj.

Kvazaŭ mistera rekompenco, instigante nian ardon, sukceso neatendite jam antaŭ la kongresdato nin alflugis. La sekretario letere atakis la urbestaron kaj tiel lerte skribis – feliĉe li povis ankoraŭ uzi la

¹¹ <https://zoeken.erfgoedbrugge.be/Beeldbank/BRU001024771>

¹² https://eo.wikipedia.org/wiki/Tjerk_Boersma

gepatran lingvon – ke Bruĝo konsentis doni subvencion finanĉan; akcepti la gekongresanojn en la famkonata skabensalonego; ludi specialan sonorilarkoncerton je la honoro de la alvenontoj; ja, eĉ konsideri la eldonon de E-lingva turista broŝureto pri nia malnova urbo.

La urbestro ĝis nun neniam aŭdis pri nia societo, eĉ tute ignoris ĝian ekzistadon kaj malgrau ĉio ni tiom multe akris. Ĉu ne prave mi parolis pri neatendita sukceso?

La pafarko ne ĉiam povas esti streĉita kaj por iomete forgesi la pezan laboradon de kongresokupado ni organizis (eble ankaŭ iomete por provi kaj pruvi niajn organaĵtalentojn?) agrablegan vesperfeston en nia nova ejo “De Nieuwe Tijger” je Moerstraat.¹³ Ĝi sukcesis laŭ ĉiuj vidpunktoj. Ŝajne kvazaŭ neniuj taskoj estis tro peza por la kvin gepioniroj. Krom kongresorganizado kaj krom vesperfestoaranĝado ni ankaŭ venigis la faman esperantiston Vilhelmo Solzbacher.¹⁴ La germana verdstelano paroladis pri la temo: “Kiel esperantisto tra la mondo; travivaĵoj el 25 landoj”. Kelkaj inter la geaŭdantaro lin petis lian subskribon sur nomkarteto; demando kiun li volonte kaj afable plenumis.¹⁵

Ekde februaro ni nur kapablis nin okupi pri la kongresaferoj. Ni al multaj eksterlandaj E-gazetoj sendis sciigojn pri la venonta kongreso petante la redakciojn por aperigo. Nia alvoko estis plenumita kaj eĉ el la malproksima Jugoslavujo oni sendis al la LoKoKo specimeno de la tie eldonita revuo “Niaj Vizaĝoj”¹⁶ kiu dediĉis tutan paĝon al la jena anonco:

IX-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

Brugge, Pentekosto 1938

Kongresoficejo: Komvest 70, Brugge, Belgujo

Dum Pentekostaj tagoj (4, 5, 6 VI. 1938) okazos en mondfamkonata kaj mezepoka urbo BRUGGE en BELGUJO IX-a Kongrese de Flandra Ligo Esperantista. Kongreso estas ege sukcesa, ĉar la programo enhavas: Vizitado de mezepoka urbo kaj ĝiaj belegoj malnovaj preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj; kun ĝiaj mondfamaj muzeoj kun pentraĵoj de Van Eyck kaj Memlinck; kun ĝiaj multaj kanaletoj, kiuj donis ĝin la nomo de “Venecio de la Nordo”. Ankaŭ artvespero, sonorilarkoncerto, sportfestoj (piedpilkluddo kaj aliaj ludoj), balo, sekciaj kunvenoj kaj ekskurso al mezepoka Damme estas sur la programo. La geeesperantistoj estas petataj senprokraste pagi la kotizon pere P-konto 4407.30 je nomo de Maria Vincke, kongresa kasistino. Por pluaj informoj skribu al Kongreskomitato je adreso: Sekretariejo de kongreskomitato, Komvest 70, Brugge, Belgujo. La kotizo estas nur 3 belgoj (por anoj de Flandra Ligo Esperantista nur 2,40 belgoj).¹⁷

La tagoj kaj monatoj ekde nun eĉ tro rapidege forflugis por la laborego farota. Sed ekzakte je la 4-a de junio 1938 la LoKoKo estis tute preta. Ni nepacience atendis la posttagmezon, t.e. la alveno de la geesperantistaro. Ni tuj diru ke la Pentekostaj tagoj estis ĉeno de sukcesoj tiel bone por la flandra Esperanto-movado kiel por nia sekcio. La programo kiun la estraranoj mem starigis, oni tute ellaboris kaj senescepte ĝi plaĉis al ĉiuj gepartoprenintoj. Ĉiu kategorio da personoj trovis dum la kongrestagoj

¹³ www.beeldbankbrugge.be FO/A10526

¹⁴ https://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Solzbacher

¹⁵ Woensdagblad, 12.1.1938: Door toedoen van de Vlaamsche Esperantistenbond (Afdeling Brugge) zal er op Dinsdag 18 januari om 19.30 u. in de Jeugdherberg (St Jansplaats) een zeer rijke en boeiende voordracht plaats hebben in Esperanto...

¹⁶ Ljubljano: https://eo.wikipedia.org/wiki/Damjan_Vahen

¹⁷ [https://nl.wikipedia.org/wiki/Belga_\(munteenheden\)](https://nl.wikipedia.org/wiki/Belga_(munteenheden))

ion laŭ sia emo: ĉu la sonorilarkoncento; ĉu la vizito de la urbo; ĉu la balo; ĉu eĉ la Sta Diservo kun E-prediko en la mondfamkonata kapelo de la Sankta Sango; ĉu la bankedo; ĉu la artvespero kun deklamado, kantado, teatraĵo ktp.; ĉu la oficiala akcepto en urbdomo kun la salutparoladetoj de delegitoj de kvin nacioj; ĉu la boatetveturado sur bruĝaj kanaletoj aŭ ĉu la ekskurso sur vaporŝipo “Jacob van Maerlant” al mezepoka Damme dum banjoludistoj aŭdigis nian kongreshimnon.

Kaj la organizintoj? Ankaŭ al ili plaĉis la kongreso ĉar ili ĝuis kaj fieregis pri la sukcesego nekredibla (preskaŭ 300 gepartoprenintoj) kaj – precipe por du organizatoroj – pri piedpilkkonkurso kontraŭ dekunuoj de Kortrijk gajnita. Fotoj de ĉiuj okazintaĵoj por ĉiam memorigas nin la neforgeseblajn tagojn.¹⁸

Tiamaniere la aventuro – verdire ĝi nur estis aventuro por organizi kiel novfondita grupo kongreson – finiĝis kaj eĉ bonege sukcesis. Decas laŭdi ĉi-tie la kvin gepionirojn de tiuj malfacilaj tagoj, nome Fernand Roose, Roger Iserentant¹⁹, Alfons Blontrock²⁰, Maria Vincke kaj Camiel Van den Bussche. (Bedaŭrinde la tri lastaj laŭorde jam forlasis aŭ la grupon aŭ la movadon.

Niaj junaj samideanoj ne pensu ke ni, kun la kolektitaj laŭroj, lace ripozis en paco post bonfinita tasko.

Tute ne, eĉ kontraŭe, ju pli ni rikoltis sukceson des pli ni efektivigis novajn planojn. Apenaŭ la kongrestagoj for, ni organizis biciklan ekskursegon iri kaj revene al Gent por ĉeesti la tie okazintan Flandran Nacian Kantfeston.²¹ La bruĝa sekcio estis la sola kiu akceptis la inviton de la gentaj gesamideanoj veni grupe al la Artevelde-urbo (3-a de julio 1938). Kelkaj semajnoj poste ni organizis aŭtobusan ekskurson al Kortrijk je invito de la E-klubo de tiu urbo por reludi la piedpilkkonkurson en kiu tiu grupo malvenkis kontraŭ nia dekunuoj dum la kongrestagoj. 22-oje ni veturis al la urbo de Groeninghe. La vojaĝo ĉiurilate sukcesis: belga somera vetero kaj la konkurso kiun ni gajnis per 2 celpunktoj kontraŭ 1. Ankaŭ la pokalon, donita de estrarano de Kortrijk honore de la venkanta dekunuoj, ni do kunportis al Bruĝo. Ni menciu tutspeciale ke antaŭ l’komenco de la ludado la kapitano de la kortrijka dekunuoj nin oferis florbukedon belegan kiun ni post la konkurso metis al la soklo de l’Groeninghe-monumento²² dum ke ĉiuj ĉeestantoj ekkantis la flandran himnon. Post la veto ni ĉiuj nin gajege amuziĝis fratiĝante kun la gemembroj de la grupo el Kortrijk. Estis jam tute malhele kiam ni finfine alvenis hejmen – ni dumvoje haltis ankoraŭ en Ingelmunster kie okazis foiro – ĉiam kantante kaj kriante pro ĝojo pri la neforgesebla tago.

“Ne laciĝante” – la vortoj de nia Majstro – ni finjulio biciklis grupe al Veurne por admiri la procesion de la gepentofaruloj²³. Dum monato aŭgusto ni ja kuraĝis viziti la aristokratan banlokon Knokke-Zoute. Panjo Siska²⁴ por ni estis la ĉefa allogo kaj la kukoj malaperis en niaj stomakoj tiel facile kaj rapide kiel neĝo fondas pro sunradio... Ne gravas, geamikoj, estas nur la grupkaso kiu pagis. Forte pro la manĝaĵoj ni esploradis en la dunoj. Ludante kaj sin amuzante ni vagadis kaj zigzagadis inter la sablomontetoj ĝis kiam ekvesperiĝis. Nur tiam ni pensis al hejmirado sed tiam ankaŭ la situacio iĝis

¹⁸ La lokaj ĵurnaloj La Patrie kaj Burgerwelzijn je 18.6.1938 aperigis artikolon pri la samtempa belga kongreso en Charleroi kun 40 bruĝaj partoprenantoj. Dum junio nenio estis trovita pri la bruĝa kongreso.

¹⁹ 1914-2008

²⁰ Eble Alfons Arthur Willem Blontrock, °20.7.1911, Groenestraat

²¹ https://nl.wikipedia.org/wiki/Vlaams_Nationaal_Zangfeest

²² <https://nl.wikipedia.org/wiki/Groeningemonument>

²³ https://nl.wikipedia.org/wiki/Boetprocessie_van_Veurne

²⁴ [https://nl.wikipedia.org/wiki/Oosthoek_\(Knokke-Heist\)#Moeder_Siska](https://nl.wikipedia.org/wiki/Oosthoek_(Knokke-Heist)#Moeder_Siska)

kritika. Pripensu momenton: jam vespere – meze en la dunoj – neniu orientigpunkto. Feliĉe ke ankaŭ por geesperantistoj – almenaŭ por la bruĝaj – ekzistas anĝelo-gardanto²⁵ kaj tiamaniere ni tamen, kvankam mortlacaj sed kontentaj, hejmalvenis. Nur du membroj kiuj ne posedis biciklan lumigilon devis vagonare reveni (preskaŭ ili mankis la lastan) kaj du aliaj pro bicikla defekto longe post la noktmezo atingis Bruĝon. Jen la lasta heroaĵo de nia somera programo.

Kaj denove ni komencis la vintran agadon: ĉiusemajne regulaj kunvenoj en nia ejo; sur la tagordo: deklamado, kantado, paroladoj, gramatiko kaj ludado. Dum monato septembro ni trioje veturis al Antverpeno ekde la sabato por ĉeesti E-feston en salonego “De Pelikaan” (organizis la “Flandrema”) kaj la posta tago ni funkciis kiel delegitoj de nia sekcio en la Ligkunveno. Tial alvenis la fino de tiu jaro fruktdona kun du gravaj projektoj en la kapoj de la estraranoj: nome (1) plano por ree organizi vintrokurson kaj (2) ideo por aĉeti belan E-grupflagon.

Jaro 1939

La 19-a de januaro okazis paroladvespero kiel enkonduko al la kurso donita de nia prezidanto F. Roose. La publika intereseĝo superis ĉion kredeblan. La granda salono de la junulgastejo estis plenplena. Al la unua leciono ĉeestis 36 gepartoprenintoj. Antaŭvidaĵoj do estis rozkoloraj. Poste ni bedaŭrinde spertis la veron de la biblia teksto: “multaj estas vokitaj sed malmultaj elektiĝis”. Ĉar ekde nia starigo la estrardevizo eĥis: “Kvalito antaŭ Kvanto” ni ne nepre ĉagreniĝis pro la perdo.

Sama monato delegacio de nia grupo ĉeestis tre belan vesperfesteton²⁶ organizita de la oostenda klubo en ĝia ejo “Oud-Oostende”.

La monato februaro restos kun oraj literoj en la historio de nia grupo: nia flago iĝis preta kaj dum gaja kaj bongusta bankedo ni ĝin inaŭguris la 6-a de marto 1939. Oni eternigis la ĝojigan fakton per fotografiaĵo kaj je nia kontenteco (ni pensu nur al la propagando senpaga) ĝi aperis en diversaj gazetoj.²⁷

Jam estis fino de marto kaj je Pentekosto (fino de majo) 1939 okazus en Antverpeno la X-a Jubilea Kongreso de Flandra Ligo Esperantista. Ĉiusemajne la estraro instigis la gemembraron al partoprenado al la kongreso. Ni volis montri al la antverpenaj gesamideanoj ke nia grupo tiel signifa kiel ĝi estis je nombro de gemembroj tamen kapablis proporcie grandnombre alveturi al la metropolo. La senĉesa propagando inter nia gemembraro estis fruktodona: sep gemembroj (tiam proksimume la triono de niaj geanoj) decidis partopreni al la tritaga restado en la havenurbo. Kio okazis dum la kongrestagoj? Kiamaniere la bruĝanoj tie pasigis tiujn Pentekostotagojn? Ĉu la kongreso plaĉis al ili? Jen demandoj kiuj mi certe povus tuj detale respondi sed mi tamen preferas min fidi al la sprita raporto kiun nia samklubano Roger Derdeyn²⁸ faris post la vojaĝo celante per ĝi interesigi la hejmgerestintajn kamaradojn dum unu de niaj grupkunvenoj. Jen lia raporto kiu detale kaj sprite priskribas la travivaĵojn de niaj sep bruĝanoj dum la X-a jubilea kongreso.

²⁵ <https://nl.wikipedia.org/wiki/Beschermengel>

²⁶ https://vikiflandrio.alcl.be/bezoek/fontoj/ev_oostende_1938.pdf

²⁷ Nenio trovita en la bitigitaj bruĝaj gazetoj.

²⁸ Verŝajne Roger Emile Derdeyn °Oostende 12.1.1916, edzigis en 1942 al Julia Onzia el Westerlo.

La deka kaj jubilea kongreso sukcesis je ĉiuj vidpunktoj. Sed, ne pensu ke kongreso nur estas eterna parolado; vere ne, ankaŭ amuzigan flankon ĝi havas, kaj por tiu parto Antverpeno certe estas la revita urbo.

Kvankam mi ne promenis okulfermite en Antverpeno, tamen mi ne bone scias priskribi ĝin. Mi do lasas paroli iun alian, kiu certe scipovas ĝin pli bone ol mi. Tiel:

<i>Tre larĝaj aleoj,</i>	<i>Parkegoj freŝombraj,</i>	<i>Kajmuroj senfinaj,</i>	<i>Urbeg' de laboro,</i>
<i>kinejo, muzeoj,</i>	<i>kafejoj sennombraj,</i>	<i>ronkadoj maŝinaj,</i>	<i>en plena vivgloro,</i>
<i>statuoj kaj placoj,</i>	<i>viroj tre spritaj</i>	<i>fajfad' de sirenoj,</i>	<i>miksaĵ' de gotiko</i>
<i>teatropalacoj,</i>	<i>kaj kosmpolitaj,</i>	<i>grincantaj katenoj</i>	<i>kaj novestetiko,</i>
<i>hoteloj, bulvaroj,</i>	<i>bieroj kaj vinoj</i>	<i>de ŝipoj kaj gruoj,</i>	<i>tutmonda haveno,</i>
<i>strataĉoj, mansardoj.</i>	<i>kaj belaj virinoj.</i>	<i>infero de bruoj.</i>	<i>jen, Grand- Antverpeno.</i>

(F.V. Dorno)²⁹

En la akceptejo ni estas bonvenigataj per amika rideto kaj koraj salutoj. Estas agrable povi rigardi ĉiujn kiel amikoj.

La formalajoj estas tuj plenumitaj kaj kun la necesaj dokumentoj mi ekserĉas nian loĝejon. Ni estis petantaj loĝigi nin en la sama hotelo, sed nia peto ne estis plenumita.

La plejgrandparto el ni revenas longvizaĝe kaj la kuraĝon en la ŝuoj. Ĉu kaŭze? ...malmola lito kaj eĉ al nia kasistino ne plaĉis la vestportilo.

Ni renkontas nun nian sekretarion kiu venis bicikle kaj dum la intima vespermanĝo inter gesamgrupanoj la gajeco regas.

Atendas ni la interkonantiga festo en la "Chatelet". La kongresantoj tie estas bonvenigataj per agrabla parolado. La teatraĵo kiu sekvas nur havas unu efikon... de tempo al tempo oni vidas manon ekkovrante tro malfermitan buŝon.

Poste balo, dum kiu la interkonatiga danco precipe akiras aplaŭdon. Ĉiu havas ĝojon en la koro kaj ridon sur la lipoj. La tempo forflugas; iĝas la unua postnoktmeze kaj ni foriras al niaj loĝejoj. Kia nokto... Mi sur la kvara etaĝo, kaj unu etaĝo pli alte angloj, kiuj loĝas litere sub la tegmentejo. Nu, tiuj (mi volas diri la angloj) dum unu horo bruigas kaj kantadas tiel ke mi pri dormado eĉ ne povas pensi. Kiam ili finfine silentas, mi aŭdas des pli bone la tramveturilojn, aŭtomobilojn, kaj aliajn bruigantajn ilojn, kiuj min, kiu kutimas la bruĝajn pacajn noktojn, tro pikadas miajn nervojn kaj malhelpas min ekdormi...

La lumigo de l'aŭroro finigas miajn suferojn. Je la naŭa Dro pastro De Coen³⁰ predikas esperante dum la sankta meso. Sendube li estas pasia esperantisto kaj ankaŭ li parolas tre bone kaj flue. Post la diservo mi renkontas la bruĝan anaron kaj kelkaj minutoj poste samideanino el Eindhoven

²⁹ https://eo.wikipedia.org/wiki/Frans_van_Dooren

³⁰ Verŝajne Joseph Decoene, 1878-1959, http://www.odis.be/lnk/PS_77793

(korespondantino de nia sekretario) alvenas kaj kune daŭrigas la promenadon. Post fotografado antaŭ la Rubens-statuo, ni supreniras la turon de Nia Sinjora Preĝejo.

Ni ĝuas la belan panoramon de la Skeldo-rivero kiu en larĝaj kurboj malrapide fluas al la maro. Kiam ni post multaj interpuŝadoj sur la mallarĝa turŝtupareto venas malsupre, ni vidas ke la kongresantoj kuniĝas antaŭ la urbdomo.

Intertempe la gereprezentantoj de la bela Bruĝo, ĉirkaŭ ilia malfaldita flago, portata de Leo Bruggeman³¹, lasas ilin fotografi antaŭ la ĉiam akvoĵetadanta Brabo. Parolante de nia flago mi devas diri ke el la partoprenantoj la nia estas la plej bela tial ke ĝi estas farita pure laŭ la animo de la kreinto de l'Esperanto lingvo. Al aliaj ankoraŭ pendas politikaj koloroj, aŭ aliaj distingaj signaloj, sed nia flago ne havas tiajn fantaziaĵojn; ne, ĝi brilas de simpleco. Esperanto ja konas nek koloron nek naciecon; Esperanto ne povas kuniri kun politiko, je mala okazo ĉar nia grupa devizo laŭtas: "Paco kaj Justeco".

Eniru la urbdomon. Ni estas bonvenigataj kaj kelkaj alparoladoj okazas. Mi staras en la malantaŭa parto de la salono kaj nur povas vidi parton de s-ro Franssen, nome liajn mentonharojn. Mi atendiĝas ĉiumomente ekvidi prezentadon de ŝnursaltarto, sed ĉio daŭrigas normala. Kiam niaj oreloj ekzumiĝas pro multaj belaj vortoj, ni estas kondukataj tra la salonoj, kiuj estas tre luksaj. Precipe la edziga salono estas bele ornamita: oni vere dezirus edziĝi kiam oni vidas tian luksaĵon, estu nur por la salono.

Post tiu oficiala akceptado ni procesie promenas en la stratoj kaj finas la rondiradon per fotografado de ĉiuj gekongresantoj sur la ŝtuparo de la Flandra Teatro. Estas jam la dua, sentiĝas la malŝatego kaj ni foriras al la bankedejo.

Al la tabloj la animstato estas tre bona, sed tiun kvalitan vorton ne meritas la manĝaĵoj; ne, tiuj vere ne estas tre eksterordinaraj. Bedaŭrinde, precipe por nia prezidanto, kiu ŝajne, tiom ŝatas bonajn pecojn. Post la manĝo ni foriras por viziti niajn senprudentajn fratojn en la zoologia ĝardeno, kaj de tien ni promenas al la kirmeso. Kion oni faras dum foiro mi sendube ne devas diri. Ni amuziĝas sur la plej plezurigaj karuseloj; plejplezurigaj al ĉiuj, escepte al Annie, nia hollanda amikino, kiu opinias alie pri ĝi, ĉar ia ilo ŝajnas ŝin tiom riska, ke ŝi pensas necese kaŝi ŝian vizagon, tute kiel struto, kiu rimarkas la danĝeron.

Tiel ni promenas al la balejo, kien ni iom tro malfrue alvenas. Annie ne plu restis longtempe ĉar la aŭtobuso al Eindhoven je noktmezo forveturis kun la gesamideanaro el tiuj holanda urbo.

Sufiĉe bruiga estas en la dancejo kaj la paperrubandoj facile trovas ĉie viktimojn. Preskaŭ je la dua ni forlasas la ĉiame dancantan homamason kaj lacaj ni iras al nia hotelo.

Kompreneble denove tiuj bruigaj angloj, sed mi estas tiom laca ke tuj mi ekdormis... Kiam mi vekigis matene, jam estis dekkvin minutoj post la naŭa. Kiel ventekblovo mi lavas min, kaj kvazaŭ flugas en miaj vestoj, ĉar la boato forveturas je la deka precize. Feliĉege mi konas la vojon ĝis la kajoj. Sur mia vojo mi renkontas Fernand kaj Maria kaj kune ni alvenas ĝustatempe. Unue ni veturas dum tempo kontraŭflue kaj poste ni reveturas kunflue al la Sankta-Anna-riverbordo. La grupo de Eindhoven

³¹ Estis kontaktpersono de katolika junulara revuo La Juna Ideo, https://wikiflandrio.alcl.be/bezoek/fontoj/re_juna_ideo.pdf_eldonita_ĉ.1936-1938; troveblas nur kelkaj numeroj de tiu revuo.

(almenaŭ tiuj kiuj ne forveturis hieraŭ) sin fordonas al ĉiuspecaj amuziĝoj kaj la gajeco transdoniĝas, ĉar eĉ ni bruĝanoj ankaŭ komencas kanti; unue la “bruĝan nacian himnon” pro kiu la prezidanto akiras aplaŭdon.... de ni almenaŭ, kaj poste aliaj kantsonoj traflugas la aeron. Sed, mi devas rimarki ke nia talento vere ne estas alta kiel tiu de la aliaj kluboj; do, ni devos ekzerci nian voĉon se ni ne volas stari en la ombro de la aliaj. Se vi estas de Bruĝo, lokiĝu malantaŭe... (kutima esprimo en nia urbo).³² Sed por elŝipiĝi ni ne estas malantaŭe; ni surmarŝas la unuajn la riverbordon dum l’Espero-kanto fonografe eksonas.

La malsato disŝiras nian stomakon kaj ni atendas senpacience la alporton de la manĝaĵoj. Tiu lunĉo estas la fino de la kongreso. Post satiĝo ni vizitas kion restas de la ekpozicio de 1930 kaj amuziĝas sur la monta glitvojo, la aŭtomobiloj, en la mirinda lando, ktp. Tiam sur la Sta Annarapidvagonaro al la tunelo, kie ni konatigas la rulantajn ŝtuparojn. Intertempe ni disiĝas. Ni estas lacegaj kaj post refreŝiga trinko ni promenas vagante serĉi niajn pakaĵojn kaj plue al la stacidomo. Ankoraŭ aliaj geeperantistoj foriras kaj je la vido de la verdaj stelo-insignoj koraj ĝisrevidoj estas interŝanĝataj. Kun eksopiro de kvietigo ni sidiĝas en la vagonaro kaj ni observas akurate la dekan ordonon al la gekongresantoj t.e.: forlasi Antverpenon kun rido sur la lipoj kaj bedaŭro en la koro.

Antaŭ ol daŭrigi la historion de la grupo ni menciuj tutspeciale – eble estis kaŭzo de la nelacigebla petado de nia estraro – la finfina eldonado de turista broŝuro en Esperanto pri nia urbo. La urbestro ĝi jam promesis dum nia kongreso sed tiam pro kaŭzoj nekonataj ne efektiviĝis la planon.

Post Pentekostotagoj la grupa vivado kiel kutime daŭrigis. En la monato julio nia estraro ricevis invitilon de “La Paca Stelo” el Ronse por grupe viziti la tie okazanta E°-ekspozicio.³³ Bedaŭrinde la grandega distanco (ĉ. 140 km iri kaj revene) iomete timigis la amatoroj de biciklaj ekskursejoj. Tamen nia grupo sendis delegiton pere de ĝia sekretario kiu sole veturis la 140 km longa vojo. Li vere ne bedaŭris la vojaĝon ĉar krom la belege aranĝita ekspozicisalonego kiun li tie admiris li ankaŭ ĝuis la ĉiam interesege naturbeleco traveturante dumvoje parton de la regiono de la t.n. “Flandraj Ardenoj”.

Monato aŭgusto rezervis malagrablajn surprizojn al nia grupo. Je la fino de ĝi mobilizacio en nia lando ekkomencis kaj kiel profesiaj militistoj du estraranoj (la sekretario kaj unu konsilanto) devige devis forlasi kaj la grupo kaj la urbo por gardadi la landlimojn “ie en Belgiujo”. La klubo malgraŭ ĉion havis ankoraŭ la ŝancon ke la militdio Marso ne postulis servadon de pliaj kamaradoj kaj sekve la ordinara vivado preskaŭ sensanĝe povis daŭrigi. Kiel ĉiujare ni denove organizis nian jam kutiman E°-vintrokurson. Ĝi tamen ne tiel bone sukcesis kiel ni fakte estus dezirintaj, ĉar la homoj tiutempe jam tro okupiĝis pri militparolaĉoj kaj mobilizadklaĉadoj kaj ne plu trovis horeton por seriozaĵoj.

Tiamaniere sen specialaj pluaj okazintaĵoj alvenis la fino de l’malnova jaro 1939.

Jaro 1940: militjaro – postmilita laborado

La unua menciinda fakto estis la ĝenerala jarkunveno kiu okazis la 1-a de februaro. Nia prezidanto ekkaptis la okazon por regali la gemembraron je kafo kaj kukoj okaze de sia jardeko kiel esperantisto. Ĉu necesas diri ke ĉiuj sekrete esperis ke baldaŭ alia membro ankaŭ iĝus jardeko en la movado?

³² https://www.youtube.com/watch?v=e7_eGup_CEG

³³ https://wikiflandrio.alcl.be/bezoek/fontoj/ev_ronse_1939_1.jpg

Bedaŭrinde la grupo ne disponas pri pluaj tiuspecaj “blankaj elefantoj”. Februaro iĝis ĉi-tiu jaro verdire eksterordinara por nia grupo ĉar antaŭ ĝia fino ankaŭ okazis nia jara bankedo. Kiel decas de bonaj geamikoj kaj konvinkitaj geklubanoj ili dum ĝojplenaj horoj ne forgesis la malfeliĉulojn kiuj kaŭze de la mobilizado ne kapablis ĉeesti. La estraro do decidis oferi memorigaĵon al la forrestinta sekretario. Tiel almenaŭ li eksciis la aferon per la marto numero de “Flandra Esperantisto”. La donaco mem li nur duonjaro poste finfine dankeme ricevis. Sed tio kompreneble estas alia rakontinda gaja historieto. La prezidanto, kiel jubileulo ankaŭ donacon ricevis. Mi tamen ne scias ĉu li ankaŭ tiel longtempe devis atendadi.

La jaro 1940 certe ne daŭrigis favore por nia grupo ĉar krom la du supre menciitaj estraranoj nun ankaŭ nia prezidanto forlasis Bruĝon por plenumi profesorajn devojn en mezlernejo de Hasselt. Jen do la juna grupo preskaŭ sen estraranoj. La terura bato tamen iomete mildiĝis pro la oferemo de kamarado Fons Norro³⁴ kiu je ĉies kontenteco kiel eble plej bone provis anstataŭigi la forrestantojn.

Por iomete forviŝi la nekutimajn cirkonstancojn la estraro decidis doni duan festenon dum monato aprilo. La festo ĉiurilate sukcesis ĉar oni ne priatentis la noktajn horojn kaj eĉ je matenkrepusko kelkaj gefestantoj ankoraŭ vagadis laŭlonge de kanalbordoj ĉe jam paliĝanta lunlumo. Verdire idilia sed mi dubas ĉu la afero ankoraŭ iomete rilatis kun la mondlingva grupfesto.

Intertempe ni ankaŭ ne forgesis instigi je partoprenado al nia XI-a kongreso kiu okazus je la 12-a de majo en Bruselo. Eble pro la mobilizado nur la sekretario kaj la prezidanto enskribis. Ili ambaŭ jam pretigis la valizojn esperante pasigi kelkajn agrablegajn tagojn en la ĉefurbo kiam kiel fulmotondro ĉe helblua ĉielo la 10-a de majo – nur du tagoj antaŭ l’kongresmalfermo – frumatene eksplodis la abomena milito. Ĝi neniigis ne nur niajn planojn sed kaŭzis kaj ankoraŭ ĝis nun ĉiam kaŭzas grandegajn malfacilaĵojn al nia agado kaj movado.

Kompreneble dum tiu situacio ĉesis ĉiu aktiveco de nia kara grupo kaj eble estus la pereigo de nia klubo se ne la ĉefaj estraranoj – feliĉe revenante tuj post militĉeso – tuj reprenis la gvidilojn kaj vikle agadis por vekigi la “belulino en arbaro dormanta”.

Nur tre malrapide ni tamen atingis nian celon. Jam en julio la grupekskursoj, iam tiel ŝatataj, rekomencis. Ni menciis laŭorde Oostende, Bredene, Knokke, Oostkamp k.a.

Tamen la entuziasmo ne estis tro esperplena ĉar nur malmultaj gemembroj ĉeestis regule la kunvenojn. Ĉu la timo de l’ĝuste finita milito ankoraŭ terurigas kelkajn? Nia aktiveco similis oleomakulon kaj sin disetendis pli kaj pli: memorebla restas la dutaga ekskursego al la “Kluisberg” apud Ronse kie ni tranoktis sub la tendovelo. Ĝi okazis dum la mezaŭgustaj tagoj kaj kvin gemembroj partoprenis.

Du semajnoj poste ni sepope biciklis al Antverpeno por tie pasigi semajnon da libertempo. Kvankam la ekskurso ne estis tute oficiale organizita la grupo tamen konsistis el ses geesperantistoj kaj ni faris la oficialan propagandon (bicikla flageto – steleto sur nia brusto ktp.)

Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj – germana registaro ne tro ŝatas la E-movadon – ni kuraĝis demandi, kaj ankaŭ obtenis, la permeson organizi kiel kutime ĉiujare nian E°-vintrokurson. Dekoj da fervoraj gelernintoj rekompensis per iliaj vikleco kaj laboremo la penadon de la estraro. Mi ne finos la

³⁴ Eble Alfons Norro 1921-1999.

komentadon pri ĉi-tiu jaro sen tutspeciala atentigi ĉiujn sur la jena eksterordinara fakto: malgraŭ la militempo, malgraŭ la okupado, malgraŭ la malfavoremo de la okupanta aŭtoritato rilate al nia movado, unuvorte malgraŭ ĉiujn okstaklojn ni daŭrigis nian laboradon kaj propagadon. Ja, eĉ dum la lasta duonjaro 1940 nia grupo estis ekzemplo de vigleco. Cetere ni estis la unua sekcio en la Ligo (eble en Belgujo) kiu daŭrigis aktivecon kaj sekve kvazaŭ similis E°-oazon en nia kaj aliaj landoj. Gemembroj estu fieregaj pri nia klubo.

Jaro 1941: Daŭrigo de nia aktiveco kaj laborado malgraŭ la okupado

Kiel rapidege forflugas la tempo. Jam nian jarkvinan ekeston ni eniris. Eble por memori tiun fakton la estraro decidis ke ekde nun ni ĉiumonate (ĉiam la lasta dimanĉo) havus amuzan grupvesperon. Post laboro, ripozo kaj streĉigo, estu kaj restu nia devizo.

Parolado pri Portugalujo de nia sekretario plenigis programon de unu el niaj unuaj semajnaj kunvenoj de la nova jaro. Ni jam plurfoje spertis dum nia ekzistado pri la taŭgeco de la proverbo: “komenco bona, laboro duona”. Kaj la estraro intencis malgraŭ la okupado de nia teritorio vigle daŭrigi la laboradon kiel kutime dum normalaj tempoj. Kun plej diversaj programpunktoj ni daŭrigis la agadon. Tamen la estraro ne kontentiĝis pri la manko de intereso ĉe la plej granda nombro de la gemembraro kiu nur tre malregule ĉeestis la kunvenojn. Aŭ ĉu la kaŭzo estis la timo pri la malhelo kaj ŝirmpafado kontraŭ malamikaj flugmaŝinoj anstatŭ manko de intereso?

Dum monato marto ni feliĉe povis sciigi al niaj gemembroj la reaperadon de kelkaj E°-revuoj kiel i.a. la konata “La Praktiko”. Fine de la monato ni komencis por la unua fojo en niaj grupaj kunvenoj solvado de enigmoj – i.a. krucenigmoj, ciferenigmoj, silabenigmoj k.a. – kun ĉefa celo la pliriĉigo de la vorttrezoro ĉe niaj gemembroj. Por efektiviĝi tion dum ordinaraj semajnaj klubvesperoj (kaj la duonhoro dediĉata al tiu programpunkto ne plu forlasis la semajnan labormetodon depost) ni konsentu ke niaj gemembroj jam ne plu estas t.n. “eternaj komencantoj”.

Meze de majo atingis nin la sciigo pri la malpermeso en Nederlando de la agado por ĉiuj societoj kun internacia tendenco. Nia kara movado per tio ricevis teruran baton ĉar Hollando iĝis – post germanizado de Aŭstrio – la “verda paradizo”.

Kun la someraj tagoj la estraro denove organizis grupekskursojn. Ni menciu i.a. la vizitado al la labirinto de Loppem al kiu niaj gemembroj grandnombre partoprenis.

Plej frapanta afero dum junio estis la intensa por E°-propagando farita de niaj junaj kamaradoj Grégoire Maertens³⁵ kaj E. Debaets en ilia lernejo. Ni cetere baldaŭ spertis la belegajn rezultatojn.

Agrablan memorigaĵon ĉe la gepartoprenintoj postrestos de iliaj faritaj ekskursoj (dufoje) al Hertsberge kie ni vizitis malnovan membrinon.

La 22-a de junio iĝis neforgesebla tago en nia ekskursiva programo. Tiam 22 gemembroj partoprenis al la 120 km longa bicikladveturado iri kaj revene al la grandega lago de Overmeire-Donk apud Wetteren. Mortlacaj kaj sunbrunitaj – estis kvazau tropika temperaturo je tiu fama tago – ni hejmalvenis je vesperiĝo kontentegaj de nia vojaĝo.

³⁵ https://eo.wikipedia.org/wiki/Grégoire_Maertens

Julio ankaŭ memoros nin interesegegan fakton sed de tuta alia speco: pro la zorgoj de la sekretario ni pendigis en nia ejo grandan kadron kun riĉa aro da fotoj el la plej rimarkindaj okazintaĵoj de nia grupokzistado.

Ŝajnis verdire kvazau ĉiu monato la estraro zorgus pri io eksterordinara aŭ almenaŭ speciala. Aŭgusto prizorgis la gemembroj boatekskurseton sur la belegaj bruĝaj kanaletoj kaj septembro piedekskursegon al mezepoka urbo Damme tra la kamparaj vojetoj. Du nekutimaj ekskursoj kiuj tamen plaĉegis al ĉiuj.

Kun la komenco de la vintra agado kelkaj membroj vigle laboradis al nepre necesegaj planoj celante reorganizaĵo de grupaferoj ĉiuspecaj i.a. la bibliotekservo. S-ro Norro en tiu laboro forkaptis la plej grandan parton. La estraro disdonis al ĉiuj gemembroj librolistojn (prezidanto kaj sekretario metis ilian E°-bibliotekon je la dispono de la grupo) el kiuj ili kapablis elekti la dezirindan legaĵon. Tial ili havis je ilia dispono pli ol 250 verkoj (i.a. ĉefverkoj de la mondliteraturo) kaj proksimume 50 revuoj kaj trezoro de E°-dokumentaro.

Plie ni ankaŭ ekstarigis ŝakklubeton, naĝklubeton, literaturklubeton kaj projektis ankoraŭ aliajn por la estonteco. Kompreneble ĉiuj tiuj klubetoj estis subsekcioj de nia E°-grupo "Paco kaj Justeco" kaj oni ilin nur starigis celante tiamaniere teni geamatorojn de tiuj diversaj ludoj kaj sportoj en nia propra rondo.

La plej grava afero antaŭ la fino de la jaro (eble la plej grava okazintaĵo dum nia ekzistado) estis la eldonado de propra revuo en la mondlingvo por niaj geklubanoj. La gazeto entenas ĉiujn imageblajn rubrikojn kaj certe ankaŭ ekster la grupo estas leginda.³⁶

Tiu fakto pruvas sunhele la laboremon kaj kapablecon de la anoj kaj la floradon de la grupo. Dum la lasta monato de la jaro ni ankoraŭ aŭdis paroladon interesan de nia prezidanto pri "La regado de Ludoviko la XIV-a". Sed la apoteoso venus je la 28-a de decembro. Tiam nia grupo organizis Kristnaskfeston tutspecialan. En la salono staris grandega kristnaskarbo sorĉe ornamita, ni forlotumis "nekonataj premioj" de certa valoro tamen kaj ni oferis, malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj por akiri manĝaĵojn, kukojn kaj kafon al nia gemembraro.

Fidante al nia kutimo ankaŭ nun ni organizis nian kutiman E°-vintrokurso kiu sufiĉe bone sukcesis konsiderante ĉiujn malagrablaĵojn kaj malfacilaĵojn kiun alportas okupado de la teritorio.

Jaro 1942 – La tria laborjaro sub malamika okupado

La kutima ĝenerala jarkunveno la estraro decidis okazigi la 15-an de januaro. Tamen por la unua fojo en nia ekzistado ni kontraŭvole devis ĉesi ĉion aktivecon dum pli ol du monatoj kaj nur je fino de marto eblis al ni ree labori. La kaŭzo estis terurega malvarmo-ondo sur nia lando kaj manko da karboj por varmigi la ejon. Feliĉe ke malgraŭ ĉio ok gemembroj de la subsekcio "ŝakamatoroj" daŭrigis ĉiusemajne kunvenojn kaj tielmaniere kvazau kuntenis la grupkernon.

La sekretario kiu jam en 1941 surprizigis la gemembraron per propono de eldonado de revuo por la membroj denove havis specialan ideon: li proponis tradukon de libro de flandra aŭtoro. La estraro

³⁶ <https://drive.google.com/drive/folders/1TDGmAzaAAi-65fM-hpAwbKEKK5jdS6nOR?usp=sharing>

elektis “La tre belaj horoj de Simforosa, beginjo” de Felix Timmermans.³⁷ La konsento de la geanaro estis unuvoĉa kaj baldaŭ la traduko komenciĝis. Alia novaĵo dum semajnaj kunvenoj: la prezidanto decidis regule prelegi kaj ekspliki el “La Verda Biblio” de Lejzerowicz.³⁸ Du laŭdindaj programpunktoj kiuj malaperis bedaŭrinde de l’programo poste.

Al s-ano Norro oni ŝuldis dankon pro diversaj paroladoj pri “muziko” k.a.

Fino de aprilo iĝis denove neforgesebla mejloŝtono en nia grupa movado: nia grupo ekzistis jam kvin jaroj. Kaŭze de militcirkonstancoj ni tamen nur tre modeste kapablis festi la okazintaĵon. Oni momente profunde pripensu ke nia grupo jam kvin jarojn ekzistas, ke ĝi daŭre laboradas kaj floradas malgraŭ multaj malhelpaĵoj kaj malmulte aŭ neniom da subteno. La programo je tiu okazo estis belega kaj verdire apoteozo por kaj al tiuj kiuj ekde la komenco bataladis por la ekesto, kreskado kaj florado de nia klubo. Dume la semajnaj kunvenoj seninterrompe daŭrigis per la kutimaj programpunktoj.

Komence de junio ni bonvenigis novajn gesamideanojn en nia grupo (estis gekursistoj kiuj sukcesis en la ekzameno). Je la somermonatoj la ekskursoj estis denove organizitaj. Pro aertubmanko oni ne plu kapablis fari longajn biciklajn ekskursojn. Sekve oni kutime iris al ludejo Ryckvelde kaj piedekskursoj al ĉirkauantaj komunumoj.

La ĉiumonataj festoj ĉiam plensukcesis. Je tiuj okazoj ĝi neniam nek tro pluvis, nek tro frostis, nek estis tro malhela surstrate. Ĉiuj tiuj malagrablaĵoj ja oftfoje okazis dum tagoj de laborkunvenoj.

Fine de septembro estis maltrankvileco en la grupo ĉar la sekretario devige devis forlasi la urbon laŭ germana ordono kaj la propagandisto pro profesiaj kialoj. Feliĉe la forresto de la unua nur estis mallongdaŭra dum ke la dua plejofte ĉeestis kiam estis decidojn gravajn priparolotaj.

Notinda fakto estis la preskaŭ seninterrompa raportfarado de R. Martens. Li tiel agante multe helpis la sekretarion kiu ĝin preskaŭ seninterrompe faris dum kvin jaroj.

Dum la kunveno de la 17-a de decembro 1942 ni memorigis la Zamenhoftagon kaj fierigis pri al nia grupo sendita gratulskribado de la ĉefestraro el Bruselo.

Por la jarfino ni kompreneble havis nian kutiman Kristnaskfeston. Kiel la antaŭa jaro ankaŭ nun ni ŝuldis plej grandan dankon al samideanino H. De Kersgieter pro la manĝarangĵoj.

Jaro 1943: Kvara militjaro

Ni regule kunvenas kaj la programpunktoj ĉiam variadas. Ofte okazis paroladoj de nia amiko R. Martens. La amuzduonhoro post la kunvenoj kreskis dum tiu jaro ĝis ne plu forigebla programpunkto.

Dum februaro nia grupo perdis du bonegajn membrojn: nia propagandisto foriris al Germanujo kaj fino E. Senaeve edziniĝis. Dum marto okazis parolado de nia sekretario pri liaj vojaĝoj tra la Kampinoj kaj Ardenoj. Ĉe la fino li esprimis la deziron organizi samspecan vojaĝon por la grupanoj. Tiu plano,

³⁷ https://eo.wikipedia.org/wiki/Felix_Timmermans

³⁸ https://eo.wikipedia.org/wiki/El_la_%22Verda_Biblio%22

iom utopia konsiderante la malfacilaĵoj de nutraĵebleco dum tutsemajna vojaĝo sub okupado, tamen realiĝis.

15-a de majo. Denove geedziĝo en la grupo. La sekretario elektis samideaninon el E°-grupo “Persisto” el Wetteren.³⁹ Por la unua fojo en nia grupo la kutima “edziĝo-fino” ne realiĝis. La 13-a de aŭgusto kvar geesperantistoj komencis rondbicikladon tra Belgujo farante propagandon dum okupado per biciklaj flagetoj. Detala raporto pri tio aperis en nia gazeto.

Antaŭ la jarfino ni ankoraŭ perdis valoran membron: Et. Debaets devige devis labori al Germanujo. La Kristnaskfestoj 1943 estis la plej brila el ĉiuj antaŭaj. La organizado ĉefe estis la laboro de nia s-ano F. Norro.

Jaro 1944: Jaro de la liberigo

Verdire iĝis kvazaŭ la jaro de la paroladoj. Mi kredas ke R. Martens venis plejofte sur la podio. Ankaŭ paroladis pri diversaj temoj: G. Claeys, F. Norro, F. Roose, R. Iserentant kaj eĉ subtenanta membro A. Denys.

Dum monato aprilo naskiĝis la unua “Paco kaj Justeco”-ido. Ni esperu ke li sekvos la gepatran ekzemplon en Esperantujo.

La tradukado de “Simforosa” finiĝis sed tute sen intereso flanke de la gemembroj. Estis la sekretario kiu mem devis zorgi por la finverkado de sia iama ideo de tradukado.

F. Norro faris laŭdindan laboron por starigo kaj organizado de retorika unuiĝo.

Kaj finfine je la 12-a de septembro venis liberigo de nia lando tiel longtempe atendita. Por la unua fojo depost kvin jaroj ni denove fiere povis propagandi per nia grupflago tra la stratoj.

La 14-a de oktobro denove grava okazintaĵo en nia grupo: geedziĝo de nia prezidanto kun s-ino De Kersgieter el nia grupo. Estis feliĉe la dua kontraŭdiro al la kutima E°-onidiro “edziĝo-fino”.

La Kristnaskfestoj ne sukcesis kiel kutime. Plie dum tiu sama festo la sekretario devis adiaŭi la gemembraron ĉar la sekvanta frumateno li pro militkaŭzoj devis forveturi al Anglujo.

Jaro 1945: Unua jaro de ne malamika okupado kaj fino de la mondkatastrofo

Plej grava fakto estis la reveno el Germanio de s-anoj Gregoire Maertens kaj Et. De Baets kaj el Anglujo de Roger Iserentant. Tamen la lasto kun la armeo ankoraŭ ĉiam vagadis tra Belgujo kaj nur je maloftaj okazoj kapablis ĉeesti kunvenon.

³⁹ Blanche Schepens, https://wikiflandrio.alcl.be/bezoek/fontoj/pe_iserentant_schepens.pdf

Du eksterlandanoj vizitis la grupon kaj paroladis. Estis s-roj Pickard⁴⁰ kaj Latiner. En diversaj gazetoj oni laŭdis la agadon de la bruĝa E°-grupo dum la okupado. Ni ne forgesu ke nia grupo estis la sola en tuta Begujo kaj eble en Eŭropo militanta kiu seninterrompe laboradis kaj kunvenis dum ĉiuj militjaroj.

Tiu gaja atmosfero iomete malheliĝis pro forsendado de kelkaj anoj el nia grupo. Ni nur pro formo mencias la fakton kaj prefere entombigu ĝin por ĉiam.

Novaĵo en la grupo iĝis la organizado per niaj zorgoj de hipnotismaj vesperoj. Tielmaniere ni enspezis monon ĉar oni ja multe da mono bezonis pro malfacilaĵoj en serĉado de nova kaj taŭga kunvensalono.

La somero forpasis per multaj ekskursoj al la maro kaj dum la aŭtuna sezono ni iris al ludejo Ryckvelde.

Tiu ĉi jaro finis sen pliaj menciindaj faktoj.

Jaro 1946: Unua senmilita jaro

Unua rimarkinda fakto estis la organizado de “Zamenhofvespero” dum monato januaro ĉar dum decembro de la antaŭa jaro ni ne havis la okazon. Kiel kutime ni ankaŭ nun aŭdis interesajn paroladojn. Ni citu nur: “La ĉefaj havenoj de nia lando”, “Pri bakteriologio”, “Kompara lingva studo kun Esperanto” k.a. Nin vizitis ankaŭ danlanda samideano kiu paroladis pri sia patrujo dum okupado. La militservado ankoraŭ ĉiam forrabis de nia grupo junajn idealistojn. Kelkaj aliaj feliĉe jam revenis post farita servado. Ankaŭ la sekretario finfine kaj definitive revenis post preskaŭ jaro kaj duono de kontraŭvola forresto kaŭze de profesiaj kialoj.

La monato de majo donis la grupon la duan “Paco kaj Justeco”-idon. Se la estraranoj (ĉar estis estraranoj kiuj prizorgis la aferon) tielmaniere daŭrigas oni nepre konsideru starigon de “Paco kaj Justeco”-infanĝardeno.

Notindaj estas niaj manifestacioj publikaj: i.a. hipnotismaj vesperoj; partoprenado en sekvantaroj diversaj; partoprenado – fakte pli ĉar nia grupo sukcesigis la kongreson – al la TJO-kongreso de Blankenberge.⁴¹ Grave ankaŭ estis la aranĝoj sur la Simon Stevin-placo por la kolektado de subskriboj por la UNO-petskribo. Kaj ĉefe kaj plej interese ni ne forgesu nian XI-an kongreson kiu ni por la dua fojo en nia urbo organizis.⁴²

Kvankam ĝi estis la unua postmilita kongreso en Belgujo, kaj malgraŭ multajn malfacilaĵojn ĉiuspecajn rilate al loĝado kaj nutrado, ĝi plensukcesis. Precipe nia dimanĉa festprogramo entuziasmigis la geesperantistojn.

Dum la jaro tri de nia membroj estis elektitaj kiel estraranoj de la Ligo.

⁴⁰ Ne estis John William Pickard (https://eo.wikipedia.org/wiki/John_William_Pickard) ĉar tiu mortis dum la milito. Eble filo?

⁴¹ Blankenberge 1946 ne estas menciita en la listo de TEJO-kongresoj je

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Junulara_Kongreso

⁴² Je 8-10 junio 1946. Artikolo en Burgerwelzijn, 15.6.1946.

Je la fino de la jaro nia grupo ankaŭ organizis veran artan vesperon en la bruĝa orgensalono kun la bonvola kunlaborado de la nederlanda kantistino Agaath Bogaert. Plej notindaj aferoj je la fino de ĉi-tiu jaro estis la akirado de definitiva kaj bona kunveno kaj nia ĉiujara kristnaskfestoj kiu iĝis unika.

Jaro 1947: Dekjara ekzisto de “Paco kaj Justeco”

Unua notinda fakto estis la starigo de sparkaso for ebligi al niaj gemembroj kiel eble plej multnombre ĉeesti la E°-kongreson en Mechelen dum majo 1947. Ekde marto nia ĥordancgrupo fervore ĉiusemajne ripetadis por la prezentado en Mechelen dum la kongreso ĉar la LoKoKo de tiu urbo petis la bruĝan grupon prizorgi la programon de la festvespero.⁴³

Dum februaro naskiĝis la tria “Paco kaj Justeco”-ido. Nia grupo zorgas por la estonteco.

La estraro ankaŭ sendis leteron al ĉiuj iamaj gemembroj por instigi al reveno al nia grupo. Tiu laŭdinda iniciativo bedaŭrinde ne estis fruktodona. Ĉiuj kunvenoj regule forpasis kun kutimaj programpunktoj: gramatiko, legado, solvado de enigmoj, paroladoj, kantado, ktp. Specialaj aferoj ne okazis antaŭ la ĉeesto de la kongreso en Mechelen. Niaj gemembroj ja havis tro da prepara laboro farota por ke ili sin okupu pri flankaj aferoj. La partoprenado de nia grupo iĝis veran sukceson. Pli ol ¾ de la aktivaj gemembroj ĉeestis. Ni ĉiuj pasigis tri agrableblajn tagojn en la ĉefepiskopa urbo. La detaloj ĉiuj gemembroj ankoraŭ bone memoras aŭ por tiuj kiuj ne ĉeestis aŭdis el la raporto farita de okulatestanto.

Por festi la sukceson obtenitan de la bruĝa grupo la prezidanto kaj sia ĉarma edzino invitis ĉiujn gegrupanojn al festeno de glaciaĵmanĝado.

Bona pruvo de la praktika uzado de la mondlingo kaj pri la amikeco inter la adeptoj estis la fakto ke per la zorgoj de grupano germana familio ricevis kelkajn fotojn de la tombo de en Belgujo batalpereita filo. Angla delegito de IEL sciigis al germana delegito ke sur tombejo de Wijnendaele ripozis kelkaj germanoj soldatoj. La germana delegito skribis al koncernata familio. Tiu familio petis fotoprenadon de la tombo al belga peranto de U.E.A. kiu transdonas la aferon al bruĝa grupo. Jen ĉeno kiu ne estus eble kunforĝi sen la helpo de mondlingvo.

Julio estis laborriĉa monato en nia grupvivado. Ni aŭdis du interesajn paroladojn pri vojaĝmemoroj el eksterlando de nia prezidanto kaj sekretario. Krome ni ankaŭ ricevis viziton de nederlanda, angla kaj du svedaj samideanoj. Unu el la svedoj senhezite deklaris ke “Paco kaj Justeco” estis la plej vigla grupo kiu li iam vizitis en- en eksterlande.

Dum monato aŭgusto niaj gemembroj libervole helpis la ostendajn gesamideanojn en ilia ĉiutaga por-esperanta laboro en la komerca foiro de Ostende.

Ankaŭ al la Ludo de la Sankta Sango⁴⁴ kelkaj gemembroj partoprenis. Ŝajnas ke ili instigos monaĥon Boon por venontfoje prezentadi la Ludon en Esperanto teksto ĉar neniu fremdulo (eĉ la multaj bruĝanoj mem) komprenis vorteton de la elparolitaj frazoj. Du gemembroj ankaŭ ĉeestis la TJO kongreso en Ipswich (Anglujo) kaj evidente ni poste aŭdis paroladon pri tiu vojaĝo.

⁴³ Programo de la kongreso: https://wikiflandrio.alcl.be/bezoek/fontoj/ev_flandra_12a.pdf

⁴⁴ https://nl.wikipedia.org/wiki/Jozef_Boon

Dum speciala estrarkunsido ni decidis laŭdece festi nian dekjaran ekziston. Tri ĉefpunktoj oni efektivigis:

1. Oficiala Bankedo. Tiu punkto jam okazis pasinta sabato. 28 gemembroj ĉeestis kaj nur post la unua horo matene hejmeniris. Mi ĉi tie tutspeciale devas gratuli kaj laŭdi la geedzojn F. Roose - De Kersgieter kiuj metis ilian domon je dispono de la grupo kaj kiuj zorgis por ĉiuj aranĝoj necesaj por la bankedo. Kun tiuj gesamideanoj eblas vivteni kaj florigi Esperanton Grupon.
2. Parolado pri la historio de la grupo.
3. Ekskurso aŭtobuŝe al Valonio.

Kaj jen ni alvenis al monato septembro de la hodiaŭa tago. Vi do aŭdis, karaj gesamideanoj, historion de nia ŝatata societo ekde l'komenco ĝis la hodiaŭa tago. Vi konsentu kun mi ke la grupo dum la relativa mallonga ekzisto jam multe travivis, jam multe laboradis, jam multe efektivigis, propagandadis, ekskursis kaj kiom da aliaj aferoj ankoraŭ faris pli. Vi komprenu ke la fondiĝo kaj la estrado dum jardeko ne estis facila tasko kaj vi komencas iomete senti ke vi ĉiuj ne povas esti indiferentaj por tiu laborego. Ju pli vi pensas al la ĝuste legita historio des pli vi fieregos esti kaj resti membro de tiu grupo. Se mi nun ankoraŭ diras ke de ĉiuj gesamideanoj (pli ol ducent) kiuj dum tiu jardeko trapasis niajn vicojn, nur du pioniroj restis de l'komenco ĝis la hodiaŭa tago, vi tiam havas la devon pruvi sekvi ilian fidelecon al la E°-ideo. Se, karaj gelegintoj, vi ĉiuj kaŭze de la ĝuste aŭdita historio volus konkludi firme en viaj koroj resti fidelaj adeptoj de nia lingvo kaj movado kaj ankrumi en viaj cerboj la ĉi-suprajn liniojn por ke vi havu ideon de ĉio kion oni povas efektivigi se la volo kaj la oferemo ne mankas, tiam mi grandskale sentus min rekompensata por la laborado kiun postulis de mi la verkado de nia grupa historio.

Kaj por konkludi mi volonte uzas la belajn vortojn de H. Conscience en sia "Leono de Flandrujo": Gemembroj, kiuj aŭdis ĉi-tiun historion, pripensu je la belaj faroj, kiujn ĝi enhavas, kio via grupo antaŭe estis – kio ĝi estas nun – kaj pli multe, kio ĝi estiĝos se vi ne forgesos la bonajn ekzemplojn de viaj antaŭuloj.